

ASISTILO



Hejmoj

CPPAP n°71486

Bulteno pri esperantaj komunumoj

(Supplément à *Asistilo* n° 24) , vintro / printempo 2000 , N-ro 14

"PostKAFE" en Ariège ?

En **Tuluzo**, 120 km norde de Balagué, okazos ĉi-somere *Kultura Arta Festivalo de Esperanto*, de la 5-a ĝis la 9-a de julio 2000. Iam estis antaŭvidita esperanta laborbrigado en Montbel (Ariège), sed ĝi ne okazos : kial ne anstataŭigi ĝin per E-kunrestado en Couserans (Balagué, Irazein, Arrout) ? Ni ne planas programon : ĉiu laŭplaĉe kaj memstare organizu sian restadon en tiuj Pireneaj valoj.

KAFE

Ĝi estas organizita de federacio *Esperanto Midi-Pyrénées* (kies sekretario Ch. Lavarenne iam estis).

Ĝi daŭros kvin tagojn, kun preskaŭ tute definitiva partopreno de jenaj grupoj: JoMo (F), Solotronik (ES), F-ino Barlaston (GB), Ĵak Le Puil, Persone (S), KTP (Katalunio), Kim (DK), Ĵo-mart & Nataŝa (Kazaĥio), J. Yvart (F), Kajto (NL).

Ĥor-staĝo kaj "atelie-roj" pri dancado, jogo, teatraĵo. (Adr. : KAFE p/a Esperanto Kultur-Centro, 1 rue J. Aillet, F-31000 Toulouse).



Poste

Eblos tranokti en la 7-ĉambra domo de la HIK-sidejo en Balagué, aŭ tendumi apude. Ankaŭ Bori, la HIK-prezidanto, pretas akcepti gastojn en Irazein (15 km, alteco : 850 m) ; kaj gvidi promenadojn en alta montaro, eventuale ĝis la pinto *Crabère* (2630 m) kun tranoktado en ŝirmejo de lago *Araing* (1900 m).

Tria ebleco, **iom pli komforta** : ĉe "Sunkompanio", en Arrout (7 km). (Tel. : komence 33 (0)5 61 ; poste, respektive : 047 066, 049 547, aŭ 968 208.)

Eventuala **migrada "Post-PostKAFE"**. Por kelkaj, la promenadoj gvidotaj de Bori povos esti taŭga trejniĝo por poste partopreni en esperanta pilgrimo **al Santiago de Compostela** (Hispanio).

S-ro Rudolph Fischer instigas al kampanjo "*Esperantistoj survoje al Santiago 2000*". Li planas piede sekvi *El Camino de* [la Vojon al] *Santiago*, 750 km ekde Saint-Jean-Pied-de-Port (kiu situas 250 km for de Balagué, do necesus aŭto), de la 15-a de julio. Li invitas "*kiel eble plej multajn esperantistojn esti samtempe survoje, por ke en la tranoktejoj por pilgrimantoj oni aŭdu nian lingvon*". Sed li "**ne celas aliĝi** al tuta grupo **aŭ organizi** tian ĉar tio tre komplikigas la piediran pilgrimadon".
Kontakto : Fischer, Gustav-Adolf Str. 2a, D-48356 Nordwalde, faks. (02573) 626 ; fischru@uni-muenster.de

Historiaj esploroj

Lasta vorto [?] pri *Esperanta kolonio en Brazilujo*

La *Confederação Operaria Brasileira* (Konfederacio de l' Laboro Brazila) sin turnas al la laborist-asocioj de ĉiuj landoj por lumigi la kondiĉojn de brazilaj laboristoj. Jen ĝi, tradukita el la germana sindikalista organo "*Die Einigkeit*".

Rio Janeiro, 27 Marto 1913

Kamaradoj ! Vi scias, ke la stato de la laboristoj de ĉiuj landoj pli aŭ malpli estas ĉie la sama. La diferencoj, kiuj ekzistas, estas ofte malmultsignifaj kaj kelkfoje tute hazardaj aŭ nur momentaj.

Malbonajn spertojn faras ordinare tiuj, kiuj forlasas sian landon, allogitaj per falsaj iluzioj kaj promesoj de la agentoj de la brazila registaro, de homoj, kiuj estas **pagataj por allogi laboristojn**, kiuj en sia propra lando ne trovas sufiĉan panon.

En Brazilujo havas la vivo de la proletario nion dezirindan, eĉ ne por landoj kiuj pleje estas turmentataj de la malsato (...)

La Ĝenerala Sekretario de la
Konfederacio de laboristoj brazilaj

Per tio estas finita la movado "*Kolonio esperanta en Brazilujo*". Mi jen deklaras publike, ke miaj informiĝoj ne estis tiaj. Kvankam ni estos liberaj, sen iaj ordonantoj, tute egale, ni ne apogas tian fi-regnon. Por mi la afero finiĝis.

Germanujo, Bavarujo,
Viktoro Strasser

(el *Internacia Socia Revuo*, 7a jaro, N-ro 8a, 1-7-1913)

Kiu scias pli, aŭ bonvolos esplori, pri tiu ĉi projekto kaj Viktoro Strasser, ties iniciatinto ? **Ĉu ĝi iel rilatas kun la provo de Paul Berthelot** (la unua redaktoro de la revuo *Esperanto*, filo de la franca ministro pri Publika Instruado Paul Bert), en Goiás en 1909-10 ? (Pri tiu ĉi vidu *H.* 7, p. 4.) □

Leteroj

Lafigère, 14-12-1999

Kara Christian, dankon pro *Hejmoj* kaj la tradukaĵoj el la okcitana, kiujn mi ĉiam legas kun intereso.

La lastnumera artikolo pri **Primoštena** esperantujo speciale interesis min, pro tio ke ni bone konas la menciitan Petro (Jayer), kiu iam rakontis al ni pri la **ĝemelado** inter la "somerumejo" de Primošten kaj tiu de **Vallon-Pont-d'Arc**. Li mem instruis esperanton [en 1960] al la tiama urbestro de Vallon, kiu samtempe iĝis mondĉivitano, kaj tutmondanigis sian urbon (...). Amike. Ĝis ! *Ana*



Feliĉan

Novjaron

Kara samideano,

Grésillon, 1-11-1999

Via propono estis laŭtlegata dum la ĝenerala kunveno kiu okazis la 31-10-1999, kaj diskutata. Bedaŭrinde ili ne estis akceptataj pro jenaj kialoj :

1/ ne ekzistas laŭnorma loĝejo en la kastelo ;

2/ la nuna financa situacio ne permesas plani tiun elspezon en proksima estonteco. Amike

(- La afero do provizore dormu.)

Mortnaskita E-komunumo ?

Paro da amikoj (nederlandano kaj kolombiano), ekloĝinte **en Hawaj**, invitis nin. Ili organizis esperanto-kurson dum nia restado.

Ili renkontis Leonardon (kaj Faith, lian kunulinon), kiu posedas belegan 15-hektaran bienon ĉe mare sur **insulo Maui**. Kiam ili diris ke ili eklernis esperanton en Kolombio, Leonardo entuziasmiĝis, kaj tiam ili decidis inviti min por instrui.

Partoprenis deko da homoj (laboristoj de la bieno kaj kelkaj bahaanoj) ; kaj Leonardo ekdeziris ke **ĉiuj parolu esperanton sur la bieno**. Do eble esperanto-komunumo kreiĝas ?

Tamen, **lastaj novaĵoj nuancigas** tiun entuziasmon. Ŝajnas ke nun Leonardo havas monproblemojn, kaj ke la funkciado de la bieno kostas pli ol la enspezoj. Li eĉ komencis aludi pri ĝia eventuala vendo... □

Werphaplus

(Ph. Chavignon)

Cetere li informas nin pri :

Gastronomia Tao-Semajnfino

7-9 aprilo 2000, en forstista domo norde de Nice :
Maison Forestière du Plan, F-06470 Guillaumes
(tel (0)4 93 05 51 98, rete : werpha.tao@wanadoo.fr).

Kaj post sukceso de duon-esperantlingva kuirarta staĝo en Arrout, gvidata de Bori, la nova HIK-prezidanto kaj profesia kuiristo, ni denove pensas iam organizi **Panan Semajnfino** (vidu n-ron 11).

Kuirarta vortareto fr.-Ea, kompilita de Ch. Lava-renne helpe de ĉefkuiristo, 15 p. (+ ol 500 vortoj)
15 FF + sendokostoj, ĉe : HIK, F-09800 Balagué.

La idealo ?

Mi ricevis de Gilbert Ledon (Brazilo) unu el liaj *Teknikaj kajeroj* ("...Al homkonforma sociordo"*) el kiu mi reproduktas jenan eltiraĵon kiel instigon al la diskuto dezirita de A. Gonĉarov (vd. H. 12, p. 7).

(...) Ni **nenion bezonas inventi** ; la ĉi-apuda skemo estas tiu kiu ĉiam ekzistis : la **vilaĝo**, kie la homoj agadis. En tia speco de municipo oni povas instali la homan vivon ankaŭ kun industrio, servoj ktp., laŭ nia moderna maniero.

La grava punkto estas **konservi** almenaŭ tri-onon de la tuta areo **por origina vegetaĵaro**, kio redonos **ekologian ekvilibron** al la tuto (...)

Por ĉiu familio (de 5 ĝis 7 homoj, kun infanoj kaj maljunuloj), ni antaŭvidu **areon de**, pli malpli, 50 oble 100 metroj (**5.000 m²**) ; tio permesas sendependecon, privatecon, evitas homan poluon kaj ebligas la faradon de **legomĝardenoj** aŭ aliaj teraj privataj agadoj, **laŭvole**. Ni cetere scias ke en 2.500 m², familio kapablas produkti siajn nutraĵojn.

Mi memorigas la leganton, ke ĉi tiu teknika kajero estas rezulto de **propraj spertoj** faritaj en mia bieno Maĉu Pikĉu, kaj ke pliaj detaloj troviĝas en mia libro *"Al la Tero returne"*...

[Ekonomio]

Post la familia kadro prezentiĝas la koopera organizado por produktado ĉu en industriaj kompleksetoj, ĉu en kultivado mem. La **kultivado** estos organizita **en alternado** por eviti la rompon de ekvilibro, precipe rilate al plagoj tiaj kia amasa reproduktado de insektoj.


En la vilaĝo oni antaŭvidu produktadon de energio (elektro ankoraŭ estas la plej taŭga), por pli altnivela komforto por ĉiuj. Laŭ la **decido de la loĝantoj** estu instalitaj kaj funkciigataj sistemoj de servoj, instruado, distro, sana prizorgo.

En skemo de "artistoj" povas funkcii, laŭ la kapabloj de ĉiu, **ateljeroj por manlaboroj**, dum la efektiva produktado estos evidente kiom eble plej transdonata al maŝinoj, robotoj, aŭtomatoj. Arto ne signifas penon. Preter la cibernetiko devas postvivi la granda homa karakterizo, la virto **esti kapabla krei**, per tiu neforigebla povo kiun ĉiu el ni posedas, **el siaj menso kaj manoj**.

Menciinde estas ke, kiel ĉiam okazis, la vilaĝo instaliĝu ĉe punktoj de akvo. La zorga uzo de **akvo estas fundamenta** por la surtera vivo.

En nia skemo ni mencias **okdek familiojn** ; kompreneble povus esti pli, aŭ ankaŭ **malpli**, laŭ la lokaj cirkonstancoj...

SKEMO DE PRINCIPO POR STRUKTURO ĈE LA TERO



La nova ordo

(...) La municipa (vilaĝa) aŭtoritato estas la **kooperantoj mem, kiuj formas komitaton** de superrigardo, de kontrolo de la aktivecoj. Tiuj komitatanoj estas eventuale elektitaj, sed ĉiuj kooperantoj laŭvice prenas certajn respondecojn laŭ sia kompetenteco, kapablo, sperto, por efektiva plenumado. **Ili neniam iel ricevu avantaĝojn**, tiel ke privilegioj ne povu aperi.

(...) En tia strukturo oni vidas ke neniu povas eskapi el la memkontrolo. La pigrulo, la ŝtelisto, la falsulo tuj malkovriĝas, estas tuj juĝata de ĉiuj, sen polico, sen ĝendarmo, sen advokato (...)

Por kiuj ankoraŭ ne perceptis la efektivigebledon de ĉi tiu ordo (kaj **pensas ke mi parolas pri ridindaj naivaj utopiaĵoj**), mi rekomendas studojn de antropologoj, aŭ simplan viziton al malgrandaj vilaĝoj, ĉu en "civilizitaj" landoj, ĉu al vilaĝoj de "sovaĝaj" indianoj aŭ aliaj triboj.

En tiuj nukleoj estas facile konstati ke **ŝtato kun leĝoj**, policistoj, advokatoj, juĝistoj, vendistoj, aĉetistoj, **bankoj, notarioj ktp.**, **ne ekzistas** pro la fakto ke **ili estus tute senutilaj**.

Ekzistaj ja homoj kiuj devas plenumi siajn "devojn" (sen rajtoj), aŭ morti. Ekzistas societoj kiuj en **interhelpo** vivas memstare, memkontrole, **memdiscipline, respektate**, ĉar ne povas esti aliaj manieroj. □

* N° 3 [Campos da Jordão, 1997 ?], p. 30-32. "La vendado ne celas profiton, sed helpon al la diskoniĝado kaj vivigado de la homa kulturo per Esperanto."

Ni ricevis

HIK elkore dankas geS-rojn Roma kaj Poul Thorsen pro la donaco al *Bibliothèque d'Espéranto du Couserans et des Pyrénées*, pere de la **Fondaĵo Biblioteka Apogo** kaj de UEA-libroservo, de jenaj libroj. Dankon ankaŭ al la franca asocio *Mille et une langues* ("Kotopo, Espace Culturel International", Lyon). Cetere ni kompatas W. Luttermann kies aŭto pereis en inundego (kun 70 kg da E-gazetoj por ni el Berlino).

Concize Esperanto and English Dictionary, de J. C. Wells ; Chicago : NTC, 1999, 419 p. (Serio "Teach yourself") (ISBN 0-8442-3764-7)

Historieto de esperanto, de Ludovikito, reviziis Gerrit Berveling, Tokyo : Libroteko Tokio, 1998, 467 p. (ISBN 4-947728-19-1)

Bibliografio de disertacioj pri esperanto kaj interlingvistiko : Suplemento, de E. Symoens ; Rotterdam : UEA, 1995, 62 p. (ISBN 92 9017 049 2)

Aktoj de la Akademio, III : 1975-1991, red. de d-ro André Albault ; Rotterdam/Paris : UEA/SAT, 1992, 77 p. ("Of. Bult. de la Akad. de E-o", 11).

Moderna bosnia-hercegovina novelo : antologio komp. de Ĝemaludin Aliĉ, 7 tradukintoj, lingve kontr. de S. Ĉoliĉ ; Sarajevo : ELBiH, 1989, 178 p.

Mi juna, de Manashi Das Gupta, trad. el la bengala Probal Daŝgupto, antaŭparolo de Meva Maron ; Roterdamo : Esperantaj kajeroj, 1989 (originala eld. : 1975), 102 p. (ISBN 0 9505323 9 8)

Kvin virinoj de amoro, de Ihara Saikaku, trad. Miyamoto Masao, lingve kontr. D.B. Gregor, enkonkond. de I. Lapenna kaj H. Tonkin ; Libroteko Tokio, 1989², 157 p. (s. "Oriento-Okcidento", 7)

La granda aventuro, kaj aliaj noveloj, de Ferenc Szilágyi, postparolo de V. Benczik ; Budapest : HEA, 1989² (1^a eld. : 1945), 151 p. (Serio "Esperantaj klasikaĵoj", n^o 3) (ISBN 963 571 264 2)

Bibliografio de disertacioj pri esperanto kaj interlingvistiko / Dissertations sur l'espéranto et l'interlinguistique / Dissertations on Esperanto and Interlinguistics, de Edward Symoens ; Rotterdam : UEA, 1989, 159 p. (ISBN 92 9017 041 7)

Jubileo : jarcento de esperanto, red. de Mark Fettes ; Rotterdam : UEA, 1988, 162 p.

En barko senpilota : plena originala poemaro, de W. Auld, red. A. de Giorgi, enkonkond. kaj studoj de R. Pérez, E. de Kock, R. de Jong, M. Boulton kaj H. Vatré, Membiografio kaj bibl. ; Pizo : Edistudio, 1987, 874 p. (ISBN 88-7036-030-4)

Adolesko : originala romano, de Blazio Vaha, kun "Modere falsa antaŭteksto" de la publikganto, lingve reviziis Péter András Rados ; Budapest : HEA, 1987, 248 p. (ISBN 963 571 172 7) (Recenzita de François Degoul en *Asistilo* n-ro 19.)

La lasta virino..., de Manuel Cofiño, trad. el la hispana de Arnoldo Aguila Miguel ; Havano : Eld. José Martí, 1987 (1986), 187 p.

Studoj pri la internacia lingvo / Etudes sur la langue internationale / Studies on International Language, red. de M. Duc Goninaz ; Gent : AIMAV, 1987, 153 p. ("Etudes linguistiques", 35)

Hura ! : ne romano, nur grimaco, de Julio Baghy, postparolo de V. Benczik ; Budapest : HEA, 1986² (1^a eld. : 1930), 424 p. (ISBN 963 571 167 0)

Parnasa gvidlibro, de K. Kalocsay, G. Waringhien, R. Bernard, reviziita, kun antaŭparoloj, de G. Waringhien ; Pizo : Edistudio, 1984³, 205 p. (ISBN 88-7036-018-0)

Ĉiu - Ĉiun : Sep jardekojn en la E-movado, Memorajoj de 86-jara optimisto, de Teo Jung, Antverpeno/La Laguna : Tk/Stafeto, 1979, 398 p. (Serio "Movado" n-ro 8) (ISBN 90 6336 011 8)

Kiel verki kaj traduki poemojn : du studoj, de K. Kalocsay ; Budapest : HEA, 1979, 26 p.

Frithiofs saga : frithjof-sagao, de Esaias Tegnér, enkonkond. kaj trad. el la sveda lingvo de Wilhelm Theodor Oeste, antaŭparolo de Lina Gabrielli ; Ascoli Piceno : Edizioni Gabrielli, 1976, 385 p. ("Plejado : beletra eldon-serio", n-ro 2).

Proverbaro esperanta, de Lazaro Ludoviko Zamenhof, alfabeto ordigita kaj kun indeksoj, de Camille Rogister, enkonduko de G. Waringhien, antaŭparoloj de Marko Fabianoviĉ kaj L. L. Zamenhof, La Laguna : Stafeto, 1974, 166 p. (Serio "Beletraj kajeroj" n-ro 10). (ISBN 400-7609-6)

Aktoj de la Akademio : 1963-1967, antaŭparolo de G. Waringhien, prez. ; Rotterdam/Paris : UEA/SAT, [1968], 74 p. (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, n-ro 9).

Specimene : parodioj kaj pastiĉoj, de Henri Baupierre ; La Laguna de Tenerife : Stafeto, 1962, 128 p. (Serio "Beletraj kajeroj" n-ro 11).

Pinta krajono, de Reto Rossetti, kun "Kelkaj vortoj" de Geraldo Mattos ; La Laguna : Stafeto, 1959, 128 p. (Serio "Beletraj kajeroj", n-ro 2).

Ĉe la sanktaj akvoj : romano el la svislanda montegaro, de J.C. Heer, el la germana trad. Bader, Le Brun, Schmid ; Bern : SES, [1947]², 213 p.